

POR ENPENSIĜO

Satano kunvokis tutmondan kolektiĝon de demonoj. En sia enkonduka alparolo li diris:

„Ni ne povas al la kristanoj malebligi, ke ili vizitadu preĝejon. Ni ne povas malebligi al ili, ke ili legu Biblion kaj ekkonadu la veron. Eĉ ni ne povas malebligi al ili en tio, ke ili ekligu intiman rilaton kun sia Savinto. Ni lasu ilin, ke ili vizitadu preĝejon. **Sed ni senigu ilin pri la tempo, por ke ili ne havu la eblecon kreadi sian rilaton al Jesuo Kristo.** Ĝuste tion mi de vi volas“, diris diablo. „Malhelpu al ili, ke ili estu en kunligo kun sia Savinto kaj dum la tuta tago konservu la vivodonan interligon!“

„Kaj kiel ni tion faru?, demandis liaj demonoj.

„Ni klopodu, ke ili estus senĉese okupataj per negravaj aferoj kaj elpensu multe da eblecoj, kiel okupi ilian menson,“ respondis diablo.

„Tentadu ilin, ke ili malŝparu, elspezu kaj elspezu kaj prunteprenadu la monon. Konvinkigu iliajn virinojn, ke ili vizitadu laborejon kaj pasigadu tie multe da tempo, kaj ke **la viroj laboru ses ĝis sep tagojn ensemajne, dek ĝis dek du horojn ĉiutage**, por ke ili ne povu permesi al si vivi malplenan vivon. Malhelpu ilin pasigi la tempon kun infanoj. Kiam iliaj familioj disfaliĝos, ne plu estos en iliaj familioj manko de la laborstreso! Konstante ataku ilian meson, por ke ili ne aŭdu tiun mallaŭtan, diskretan voĉon. **Loginstigu ilin, ke dumvojaĝe ili konstante funkcigu radioaparaton aŭ magnetofonon, ke hejme ili havu konstante funkciajn televid-aparatojn, kompaktdiskilojn kaj komputilojn, kaj estu atentemaj, ke en ĉiu vendejo kaj restoracio konstante ludu la profana muziko.** Tio tute okupos ilian menson kaj interrompos ilian kunligon kun Kristo.

Zorgu, ke ili havu sur la tabletoj dum kafotrinkado amason da revuoj kaj gazetoj. **Dudek kvar horojn ĉiutage ataku ilian**

cerbon per raporto. Dum ŝoforado ilin ĝenu per reklamtabuloj.

Plenigu iliajn retroŝtajn kestojn per senencaĵoj, katalogoj de varoj, prognozadoj kaj per diversaj novaĵoj kaj ofertoj de prezreduktoj kaj produktaĵoj, senpagaj servoj kaj falsaj esperoj.

En gazetoj, revuoj kaj en televido konstante prezentadu sveltajn belajn modelulinojn, por ke la viroj ekkredu, ke la plej grava estas ekstera beleco kaj ke ili komencu esti malkontentaj pri siaj edzinoj.

Klopodu, ke la edzinoj estu tro lacaj, ol ke ili povu ennokte ami siajn virojn. Aldonu al ili al tio ankaŭ kapdoloron! Se ili ne donos al siaj edzoj la bezonatan amon, ili komencos ĝin serĉi aliloke. Tio rapide disfalgos iliajn familiojn.

Donu al ili Santa Claus-on, por ilin forkonduki de ekspliko de la ĝusta senco de Kristnasko al siaj infanoj. Donu al ili paskan leporeton, por ke ili ne parolu pri Lia resurekto kaj potenco kontraŭ la peko kaj la morto.

Konduku ilin ankaŭ al tio, ke ili estu malmoderaj ankaŭ dum la ripozado. **Strebu, ke ili el ripozferiadoj revenadu elĉerpitaj. Okupadu ilin, ke ili ne havu la tempon iri en la naturon kaj mediti pri la Dia kreitaĵaro.** Anstataŭ tio sendadu ilin al amuzaj parkoj, sportaj aranĝoj, ludejoj, koncertoj kaj en la kinejon.

Precipe ilin konstante okupadu!

Kaj se ili kolektiĝos por la spirita komunejo, sugestu al ili, ke ili ĝin plenigu per vantaj paroloj kaj sensencaj babiladoj, por ke ili hejmen revenu kun ŝarĝita konscienco.

Plenigu iliajn vivojn per multe da bonaj objektoj, por ke ili ne havu la tempon ĉerpi la forton ĉe Jesuo. Tiel ili estos preskaŭ por ĉio solaj kaj pro tiuj bonaj aĵoj ili oferos sian sanon kaj familion.

TIO EFIKOS! Tio funkcios! Tio do estas la plano!“

Demonoj fervore ekagadis kaj klopo-
dadis, ke la kristanoj estu ĉiam pli kaj pli
okupataj kaj instigataj kaj ke ili kostante
kuradu tien kaj reen, ke ili ne havu la tem-
pon por sia Dio kaj siaj familioj, ke ili ne
havu la tempon rakonti al la aliuloj, ke Jesuo

havas la potencon ŝanĝi ilian vivon.

Ĉu la diablo sukcesis en tiu ĉi plano?
Juĝu mem! Ĉu signifas esti daŭre „OKUPA-
TA“, esti sklavo de la diablo?

Se vi ne estas tro okupata, legigu tion al
la aliuloj. ■